




Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1991 — 2


(APRIL-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



H. Hodler
GENEVO
Redaktoro de «Juna Esperantisto»




W. H. Trompeter
SCHALKE



V. Gernet L. K.
ODESSA
Estinta redaktoro de «Lingvo Internacia»

... mecenatoj en Esperantujo



... Kasteloj de la Loire de la XVI-a jarcento

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150-BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangaul)	2
La Loire-kasteloj (XVI-a-XVII-a)	
E. Motillon	3-5
Atlantido (fino) S. Boniol	6-7
Jules Verne (el prelego)	8-9
Mecenatoj en Esperantujo (B. Golden)	10
Monte Kristo (sekvo) tr. R. Dupuis	11-13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

Kvankam la ĉeestantaro estis nur meznombra dum la Printempa Renkonto, tridek sep personoj el kiuj dudeko da infanoj, la tuta periodo estis tre interesa. La gvidado de Ilona Koutny alportis ion novan, alte taksatan de la Esp.-instruantoj kaj instruontoj, kiuj venis por trovi konsilojn kaj novajn instru-metodojn. Sed, kompreneble, ses tagoj ne sufiĉas por fari ĉion necesan.

Pri la someraj staĝoj, ŝajnas, ke la juna dusemajna periodo grupigos la kutiman nombron da ĉeestantoj. La unua semajno de julio ŝajne

ne allogas nombron indan je la Seminario A de Ĉe-metodo gvidota de Ewa Bondar. La kvar sinsekvaj periodoj de julio kaj aŭgusto tre verŝajne estos tiel sukcesaj, kiel kutime, ĉefe la semajnoj post la UK en Bergen kaj la SAT-kongreso en Ottignies. Dum la lastaj du semajnoj de aŭgusto sin anoncis ankaŭ dudeko da bulgaraj gesamideanoj.

Dum tri tagoj de julio la Esperanto-Domo gastigos tri ĵurnalistojn kaj teknikistojn de la Svisa Televido, kiuj inkluzivas Esperanton en serio pri la lingvoj en Eŭropo. Interesa iniciato. Ni nur bedaŭras, ke la franca televido daŭre blindas kaj mutas rilate Esperanton. Espereble ĝi aĉetos la filmon por prezenti ĝin al la Francoj!

NIAJ LEGANTOJ BONVOLE PARDONU
NIN PRI LA PROKRASITA APERO DE
TIU-CI NUMERO DE K.K. DIVERSAJ
KIALOJ, NE NUR TEKNIKAJ, KULPAS.

Esperanto tra la Mondo



UEA-KONGRESOJ - La universala kongreso 1992 ne okazos en Prago sed en Vieno. Por la postaj jaroj kandidatigis: Valencio (1993), Seoul (1994), Tampere (1995).

EL ALBANIO - La 9-an de marto, kadre de la Kultura kaj Arta Komitato de Albana Popola Socialista Respubliko estis fondita la unua landa Esperanto-organizaĵo. Tuj ĉe la komenco, Albana Esperanto-Ligo informis, ke ĝi havas 192 membrojn. Jam la Ligo preparas lerno-libron kaj vortarojn sed bedaŭrinde ne havas grandajn financajn eblecojn.

EL EKSTREM-ORIENTO - La Scienc-Teknika Esperanto-Instituto kune kreita de la Ĉina Scienc-Teknika Administra Universitato kaj la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio komencis akcepti lernantojn. Nun en ĝi funkcias du fakoj, nome: internaciaj ekonomio kaj komerco, akupunkturo kaj masaĝo. Estas 55 lernantoj, kiuj, interalie, studas Esperanton.

Korea Esperanto-Asocio, kiu publikigas interesan revuon "La Espero" organizis vintran tutlandan renkontiĝon kun 102 partoprenantoj.

La ĉinaj eldonaĵoj en esperanto publikigis faldfoliojn kun la listo de 53 infanaj libroj, 9 geografiaj kaj 7 historiaj.

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCŬOJ - De 1983, tiu internacia universitato, kies ĉefa laborlingvo estas esperanto, regule organizas kursojn kaj prelegojn en diversaj landoj kvankam ĝia sidejo estas en la Respubliko San Marino. Nun estas filioj en Bialistok (Pollando) kaj en Sibiu (Rumanio). Lasttempe fondiĝis AIS-oficejoj en Debrecen (Hungario), Ateno (Grekio) kaj Paderborn (Germanio), kie situas la ĉef-sekretario de la organizaĵo. Studsesio okazos en Sovetunio de la 29-a de decembro 1991 ĝis la 7-a de januaro 1992 en Moskvo kaj Leningrado.

ESPERANTO-MUZEŬOJ - La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (Aŭstrio) havas novajn horojn de malfermo: lunde, vendrede, 10-16 h.; merkrede 10-18 h. Adreso: Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 Wien.

Franca Nacia Esperanto-Muzeo, 19 rue V. Hugo, F-70100 Gray. Informas la kuratoro: S-ro Geo Junier, "La hejmo", 67/2 Faubourg des Perrières, 70100 Gray, tel. 84-65-11-73. Tel. de la muzeo: 84-64-81-92.

INTERNACIA LINGVO kaj MUZIKO

La israela komponisto Yiman Leef partoprenis lastan festivalon de la Mondaj Muzikaj Tagoj en Oslo per okĉofa ĥora komponaĵo en kiu li uzis du esperantajn tekstojn de Zamenhof.

Dum la kongreso en Bergen estos prezentita muzika poemo, frukto de kunlaboro de la poeto W. Auld kaj de la usona komponisto Crawford Gates, kiu mem kreis la muzikon.

La Esperanto-Rok-Asocio "Eŭroka" (F-31450 Donnevill), povas interalie liveri al vi tri diskojn el Sovetunio, en esperanto: "Eterna Muziko", klasikaj tradukitaj kantoj de la esperanto-ĥoro el Leningrado; "Somera Mondo", kanzonoj de Jomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaĥ; diskego de rokmuziko "Dsetin" de Vladimir Soroka.

INTERPRETISTOJ - Estas kreiĝanta internacia skipo de interpretistoj por eventuale deĵori profesie okaze de plurlingvaj kongresoj. Informas: Pedro Aguilar Sola, C.so de Nicola 22, I-10129 Torino, Italio.

GAZETO PRI SPRITAJ LUDOJ - Komencis aperi la dumonata gazeto "Enigmo", kiu entenas multajn ludojn (Krucvortojn, rebusojn, enigmojn, ktp.) Redakcio: 3, rue Van Gogh, F-31100 Toulouse.

Turenaj Kasteloj

XVI-a XVII-a j.c.

Laŭ la historiistoj la Mezepoko finiĝas kun la XV-a jarcento. Efektive la lasta jardeko de tiu jarcento povas esti rigardata, kiel la matena krepusko de nova epoko. La malkovro de Ameriko, la presilo, la kompaso, la pulvoro estis ŝanĝontaj la viv-kondiĉojn ĝis nemezurebla grado. Ankaŭ arto estis ricevonta novan impulson, rejuniĝon; dank'al la klasika influo disvastiĝanta en Eŭropo per la Italaj artistoj.

Jam ne estas timindaj la senĉesaj internaj bataloj; la militoj kun eksterlando ne plu atingas la centron de Francio. La lastaj invadintoj, la Angloj, estis forpuŝitaj en sian insulon fare de la energio kaj genio de simpla kamparano, Johanino d'Arc. Unu el la Turenaj kasteloj, Chinon, estis la ekirpunkto de la liberigo de Francio. Fariginte sian armaĵon kaj sian standardon en Tours, Johanino iris al la reĝo por lin konvinki pri la urĝa neceso tuj krei armeon, batali kontraŭ la Angloj, finiĝi la sieĝon de Orleans, nia lasta fortika urbo. Do, ni iru al Chinon. Sur la supro de la monteto, kiu bordas la riveron Vienne, la kastelo aperas al ni, kiel longa konstruaĵaro, ĉirkaŭzonita de dikaj muregoj kaj altaj turoj. Fakte, ĝi konsistas el tri kasteloj kunigitaj; kaj malgraŭ sia duonruiniĝo, ĝi estas unu el la plej grandiozaj mezepokaj fortikaĵoj de nia lando. Interne ni vidos la restaĵojn de la ĉambro, kie okazis la drameca renkontiĝo de Johanino d'Arc kun Karlo la VII-a.

Tempo rapide forflugas. En la paciĝinta lando, ne plu estas bezonataj la potencaj fortikaĵoj konstruitaj dum la antaŭaj jarcentoj. La militistaj kasteloj fariĝas riĉaj plezuraj loĝejoj. Lukso povas sin montri ekstere, fenestroj povas

malfermiĝi al la belaj pejzaĝoj. La gotika stilo, kies regado estas finiĝonta, kreas multajn ĉefverkojn. La lasta kaj la plej fama el ili estas la kastelo de Amboise, vera cignokanto de la Mezepoko. En la jaro 1492 - en tiu sama jaro, kiam Kristoforo Kolombo trovas Amerikon - reĝo Karlo la VIII-a komencigas la konstruadon de la kastelo. Tiu-ĉi estos vere reĝa palaco. Tia konstruaĵo ankoraŭ ne estis konceptebla sen militista aspekto. Plie, la fortika kastelo estis okulfrapa simbolo de la reĝaj potenco kaj majesto. Tial Amboise, laŭ sia ĝenerala aspekto, estas impresiga fortika kastelo. Konstruita sur alta kruta promontoro, ĉe la kunfluejo de Loire kaj ties alfluanto, Amasse, ĝi fiere superstaras la urbon kaj estas videbla de tre malproksime. Se ni alvenas laŭ la dekstra bordo de Loire, ĝi aperas antaŭ ni kun siaj tutaj majesteco kaj harmonio. La belega fasado de la "reĝa loĝejo" kun siaj altaj, gotikaj fenestroj kaj sia balkono el forĝita fero nepre naskas admiron pro sia eleganteco. La dika turo de la "Minimoj", kiu ĝin flankumas maldekstre, aldonas impreson de forto kaj potenco. Je l'unua rigardo, la kastelo montriĝas tia, kia ĝi estas: reĝa domo kuniganta elegantecon kaj potencon.

Origine ĝi estis vasta aro de konstruaĵoj zonanta grandan internan korton kaj belegan ĝardenon. Nuntempe nur restas la "Reĝa Loĝejo", du dikegaj turoj kaj la ĉarma kapelo de Sankta-Huberto. Tiu kapeleto, kvazaŭ ŝprucanta el la remparo, estas vera juvelo de la flamforma gotika stilo. La harmonio de la proporcioj, la delikateco de la skulptaĵoj, vera ŝtonpunkto, nepre naskas admiron de la vidantoj, eĉ la plej krudaj malkleruloj pri arto.

Ni vizitu nun la "reĝan loĝejon". Tie efektive troviĝis la privata ĉambro de la reĝo. Tra bela balkono el aĵure skulptita ŝtono, ni eniras en arkadan galerion nomitan "la somera gardista ĉambro". Sur la unua etaĝo, laŭlonge de "la arta "Salle des Etats" (Salono de la

Parlamento) troviĝas la "balkono de la konspirintoj, ĉefverko el la forĝarto de la XV-a jarcento. La interno konsistas el du elegantaj navoj, kies volboj sin apogas sur delikate skulptitaj kapituloj. Ĝi estas dividita en lukse meblitaj ĉambroj.

Post la reĝa loĝejo ni eniras en la turon de la "Minimoj". Dank'al ĝia rimarkinda spirala deklivo, rajdantoj kaj kaleŝoj povis aliri ĝis la supro de la turo. Ĉe la suda remparo, simile konstruita, la turo "Hurtault" ebligis rajdon kaj veturon ĝis la "reĝina loĝejo", hodiaŭ malaperinta. Tiu luksega domo estis ja taŭga kadro por la sennombraj festoj, bankedoj, baloj, maskaradoj, turniroj, besto-bataloj organizitaj de la reĝo.

Dum la jaro 1560, finiĝis la brila epoko de la kastelo. Konspiro kontraŭ la reĝo fare de la "Protestantoj" estas elkonita; la konspirantoj estis arestitaj kaj mortigitaj. Iuj estis senkapigitaj, aŭ ligitaj en sakoj kaj ĵetitaj en la riveron aliaj estis pendigitaj je la balkono, kiu de tiam estas nomata "la balkono de la konspirintoj".

Post tiu vento la reĝo forlasas la kastelon. Ĝi utilis poste, kiel ŝtata malliberejo. Fine, de 1848 ĝis 1852, ĝi fariĝis la deviga restadejo de Abd-el-Kader, la Alĝeria venkito. Nun la kastelo refariĝis posedaĵo de la franca reĝa familio. Grafo de Parizo, nuna pretendanto al la franca trono, prizorgas ĝian konservadon.

Gloro ja estas tiu kastelo de Amboise. Sed, eble, ĝia plej bela ĝortitolo estas: naskiĝloko de la Franca Renesanco. En la jaro 1496, kvar jarojn post la ekkonstruo de la kastelo, reĝo Karlo la VIII-a batalinte en Italujo, revenis kun grava militakiraĵo, sed ankaŭ kun dudek dungitaj Italaj artistoj. Kun surprizo Karlo konatiĝis kun la klasika itala arto kaj volis ĝin konigi al la Francoj. Tiel naskiĝis tiu arta movado, kiu tiel profunde influis la eŭropan ĉiviliz-

acion. Oni povas senerare asigni la jaron 1496, kiel naskiĝdaton de la Renesanco, t.e. renaskiĝa epoko, kaj kiel naskiĝlokon, la kastelon de Amboise. Kelkajn jardekojn poste, reĝo Francisko la 1-a venigis en Amboise la universalan genion Leonardo da Vinci. El la kastela teraso, oni povas vidi la kasteleton "Clos-Lucé", kie la senegala artisto vivis kelkajn jarojn kaj mortis en 1519. Tamen la kastelo estas pure gotika verko. Nur kelkaj ornamaj detaloj montras la naskiĝantan italan influon. La bela renesanca konstruaĵo, kiu limigas sude la korton, estis konstruita 20 jarojn poste.

De tiam, la arto de la konstruantoj, renovigita, naskas plenajn ĉefverkojn. Laŭ la vortoj de eminenta verkisto, "la alianco de la franca kaj itala inspiroj lumas de originala belegeco". Efektive la francaj artistoj tute ne kopiis siajn italajn mastrojn. Renovigante sian propran inspiron, per la suda artesprimo, ili kreis vere originalan stilon, esence francan.

Ni nun iros al Blois. Tie, ni vidos, kiel la fortikaj kasteloj transformiĝis dum la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj. Ni eniras tra bela gotika pordo, kun rimarkinda statuo de reĝo Ludoviko la XII-a rajdanta. Enirinte la vastan korton, ni estas surprizitaj de la kontrasta aspekto de la konstruaĵoj, kiuj ĝin ĉirkaŭas. Konstrueroj el ĉiuj epokoj restis post la detruoj kaj ruiniĝoj. Blois ja ne ŝajnas unu sola kastelo, sed pluraj kasteloj kunigitaj. El la malluma primitiva konstruaĵo, ekzistas ankoraŭ masivaj muroj kaj du turoj. La XIII-a jarcento lasis la belan ĉefan ĉambron de la kastelo, kiun starigis la grafoj de Blois. Limigante sude la korton, la galerio konstruita de princo Karlo de Orleans dum la XV-a jarcento estas modelo de la tiama arkitekturo. Konstruita el brikoj kaj ŝtono, preskaŭ sen ornamaĵoj, ĝi naskas admiron per la harmonio de siaj proporcioj.

Je la fino de la XV-a jarcento, reĝo Ludoviko la XII-a konstruigis la alon, kiu ricevis lian nomon. Ĝi plene akordiĝas per siaj ĝeneralaj linioj kun la galerio de Karlo, sed ĝin kontrastas per abundego da riĉaj ornamaĵoj. Ĝi meritas specialan atenton. Sur ĝi, sin montras la unuaj influoj de la italaj artistoj; tradiciaj gotikaj temoj najbaras italajn ornamaĵojn. Ĝi estas plej bela ekzemplo el tiu epoko transira de la mezepoka arto al la baldaŭ triumfanta renesanca stilo. Rigardante ĝin, ni povas vidi, kiel la nova arto kunplektiĝis kun la malnova, kaj antaŭvidi ĝian evoluon.

Fronte de tiu konstruaĵo, staras la alo konstruita de reĝo Francisko la 1-a je la komenco de la XVI-a jarcento. Estas unu el niaj plej belaj Renesancaj monumentoj. Ĝia fasado tute konstruita el blanka ŝtono kaj ĝia ornamo estas plene italaj. Plej admirinda estas ĝia aĵura ŝtuparo, luksege ornamita, senegala arkitektura kaj skulpta ĉefverko.

Akre kontratas kun la aliaj partoj de la kastelo, la alo konstruita de Gastono de Orleans dum la XVII-a jarcento, laŭ la planoj de Mansart, la arkitekto de Versailles. Ĝi estas bela ekzemplo de tiu klasika, grandioza, kvankam iom severa stilo, kiu karakterizas tiun epokon, nomatan de la Francoj "La Granda Jarcento".

La vizito de la ĉambraroj estas tre interesa. Rimarkindaj estas la kamenoj. Bedaŭrinde ne estas sufiĉe da mebloj por viviĝi la ĉambrojn. La plej vidinda el ili estas la kabineto de reĝino Katarino de Medicis. Tie ni povas ankoraŭ admiri la 237 panelojn el skulptita ligno, kiuj tegas unu el la muroj. Inter ili kvar kaŝis la ŝranketojn, kie la reĝino metis siajn famajn venenojn. Lertega mekanismo malfermis ilin. La tuto estis tiel bone farita, ke ne estis eble distingi la kaŝejon. Kaj nur post longaj esploroj ĝi estis trovita.

En la kastelo de Blois okazis multaj gravaj eventoj. Ni parolos nur pri unu, kiu estis decidiga

faro en la franca historio. Dum la fino de la XVI-a jarcento, la familio de Guise fariĝis tre potenca, kaj la Duko strebadis renversi reĝon Henriko la III-a por havigi al si la reĝecon. Per senĉesaj intrigoj, li sukcesis akiri potencon, kiu endanĝerigis la reĝon. Tiu-ĉi ne kuraĝis publike akuzi kaj juĝigi lin, ĉar li timis, ke la amikoj de duko de Guise kontraŭstaros. Henriko do decidis mortigi sian malamikon. La murdo okazis en la jaro 1588 sur la dua etaĝo de la kastelo. La ĉambro, kie ĝi okazis, konservis sian tiaman aspekton. Per tiu murdo la reĝeco restis en la reganta familio. Se Duko de Guise sukcesintus sendube la estonto de la regno estus ŝanĝita.

Ni vidis en Blois la ekfloron de la Renesanca stilo, kiu kulminas dum la XVI-a jarcento. La reĝoj ankoraŭ konstruas, sed iliaj kasteloj jam tute ne plu estas fortikaĵoj, sed nur plaĉaj luksegaj palacoj. Tamen la militista tradicio daŭradas. La ĉefaj elementoj de la mezepokaj fortikaĵoj estas ankoraŭ uzataj. Sed ilia malluma, teruriga aspekto malaperas. Larĝaj kaj altaj fenestroj prilumas la fasadojn, la kreneloj fariĝas ornamaĵoj. La arkitektoj mildigas la severecon de la aloj per la elegantaj linioj de la itala gusto. Abundego da delikataj skulptitaj temoj riĉigas la tuton. Tiu kunfandiĝo de la franca tradicio, volonte iom fantazia, kaj de la klasikaj italaj novaĵoj estas farita kun tia plena gusto, tia sento de ekvilibro kaj ĝusta mezuro, ke neniam ambaŭ inspiroj kontrastas. Male, la franca renesanca arto estas plena je supera harmonio. La Turena landeto posedas senegalajn ĉerverkojn de tiu epoko.

El prelego farita en la Kultura Esperanto-Domo Gresillon de

Eloi MOTILLON

ATLANTIDO

Ni nun komparu religiojn, kutimojn eĉ legendojn. Ĉirkaŭ 3 200 a.K. la egipta civilizacio faris grandan paŝon. Notindas koincido inter la praa egipta kaj la azteka kalendaroj. Laŭ ambaŭ la jaro komenciĝas la 26-an de februaro. Similecon oni ankaŭ rimarkas inter la egipta kaj majaa arkitekturoj: en ambaŭ troveblas piramidoj, obeliskoj, steleoj, bareliefoj.

La antikvaj Peruanoj havis hieroglifan skribsistemon proksiman al tiu de Centr-Amerikaj civilizacioj. En Meksikio giganta piramido estis konstruita sur montopinto, por ke la homoj sin ŝirmu tie en okazo de diluvo. La altaj aztekaj piramidoj estis tiel konstruitaj, ke la pinto estu uzata, kiel bazo de templo.

Jen pliaj konstatoj por firmigi la hipotezon pri interkontinentaj trapasejoj. Elefanto (aŭ mamuto) estas ofta temo en la indiana arto. Kolumbianoj diras, ke mortis la mastodontoj pro teraltiĝo sur la loko, kie ili sin paŝtis. Teraltiĝo en Sud-Ameriko kaj inundo en la siberiaj marĉoj estus okazintaj en la tempo menciita de Platono.

Mirigas blankaventraĵ fokoĵ en la acora regiono, ĉar ili ne kutimas naĝi en profunda maro. Laŭ la atlantida hipotezo ili estus sekvintaj marbordon, kiu preskaŭ seninterrompe kunigis la antikvan kaj la novan kontinentojn. Ili eble estas tiuj marvirŝafoj, kies haŭton uzis la atlantaj reĝoj por havigi al si harbendojn?

La centr-amerika metalurgio nin konfuzas pro sia perfekteco. Oro estas "la larmoj de l'suno" kaj arĝento "la larmoj de l'luno". Kaj dum la bronza epoko aparte brilas la etruska civilizacio. Platono citas Ligurion (la landon de la Etruskoj), kiel atlantidan kolonion.

Perceptataj, ĉu kiel legendo, ĉu kiel religia dogmo, diluvorakontoj aperas en ĉiu kulturo, plejparte ĉe la popoloj en Nord-kaj Sud-Ameriko. (Nur parta oni konsideru diluvon ĉar se ĝi enabismigus la tutan terglobon la akvoj ne havus lokon por retiriĝi).

Ni komprenu la diluvo-fenomenon, kiel inundon kun pluvegoj kaj klimataj ŝanĝiĝoj.

La tiutema plej konata de ni teksto estas la sepa ĉapitro de la Genezo. Sed Kox-Kox estas la Noa de la meksikia kataklismo. Li savis sin kun la edzino sur cipresligna flosŝipo. En la priskribo de centr-amerika diluvo (tutsimila al la biblia), nur muŝbildo transvivis la katastrofon kaj venis kun branĉeto en la beko. Ĉe la nord-amerikaj indianoj, en la regiono de la Lagegoj, la homo savis la bestojn, kiuĵ grumbilis kontraŭ li; de tiam ili perdis la parolpovon.

Se Atlantido malaperintus, tio klarigus la similecon de tiom da kredoj ambaŭflanke de la Oceano.

Apartan legendon de nia Bretonio ni aldonos. Temas pri la urbo Is, kiun tiel kortuŝe prikantis la muzikkomponisto Lalo en sia operverko. Por puni la tieajn pekulojn Dio permesis, ke sisma ondego enabismigu la urbon. La nomo Is signifas malaltan urbon. La havenon dividis pluraj basenoj; kanaloj ilin kunigis kun la oceano. Dum la kvara aŭ kvina jarcento postkrista malpaciis la reĝo, vera kristano, kaj lia filino, titolata "sorĉistino", emblemo de la antaŭkristana religio (eble druidismo). La urbo sindediĉis al la diablo kaj ĉiutagaj abomenaĵoj plenumiĝis. La homoj diboĉadis (samkiel la Atlantoj, punitaj pro malobeo al la diaj principoj). Dum la reĝo dormis la princino ŝtelis de li la ŝlosilon de la kluzoj, ĝin transdonante al sia amanto, emblemo de l'malbono. Venis abato por savi la reĝon. Sed ĉi lasta, premata pro kompato nepre volis savi sian filinon. La abato ŝin derajdigis, por ke ne pereu la patro. Ambaŭ surgrimpis monton, el kies pinto ili kontemplis la iaman urbon.

Skafandristaj arkeologoj trovis subakvajn ŝoseojn en direkto al Kornvalo. Ĉu ĉi tie ĝi staris? Sed ne nur en Bretonio ekzistas legendo pri subakvigita urbo, sed ankaŭ en britio, Irlando kaj Kimrujo.

Pro naturaj katastrofoj la Keltoj elmigris el Centr-Eŭropo, sia deven-

lando. Ne maristoj ili estis (ili venis de transreja Harco). Ĉirkaŭ la jaro 1 200 a.K. multaj establiĝis surborde de la Balta Maro pro iom-post-ioma sekigo de la Turka-Siberia Maro (nuna Kaspio). En norda Germanujo kaj Svedujo maldensiĝis la arbaregoj. Poste revenis malseka klimato. La palafitoj estis forlasitaj. La popoloj amase fuĝis el la bordoj de la Norda kaj Balta Maroj en direkto al Britujo.

Kial ne konkludi parolante pri lingvoj? Ĉu restas spuroj de unu lingvo datiĝanta de la praaj tempoj kaj ligita kun iu lingvo de la antikvuloj? Jese respondas la Vaskoj. Antaŭ la Kelta konkero, la Iberoj parolis la vaskan, kiu elmontras pli da similaĵoj kun la indianaj lingvoj, ol la hindeŭropa tutaĵo, al kiu ĝi estas tute fremda. Sama konstrumaniero, kiel en la aglutinaj lingvoj (la finna, la hungara); simileco kun la eskima kaj amerik-indianaj, en kiuj malsimplaj vortoj konsistigas tutajn frazojn. Kelkaj vaskaj esprimoj ŝajne datiĝas de la tempo de la kavernoj. Tranĉilo estas tranĉo-

ŝtono; plafono estas supro de la kaverno. La prahistorio de la vaska popolo respondus la diversajn migro-ondojn al Hispanio kaj Francio, ankaŭ sinsekvajn inundojn en Atlantido. La vaska, nek influis la aliajn lingvojn, nek estis influita de ili. Ĝi estas iaspeca pluivanta fosilio datiĝanta de antaŭ la glacia erao.

Aliflanke, ĉu ne mirige trovi komunajn esprimojn ambaŭflanke de la oceano, se nenia irvojo ekzistintus? "Atl" estas akvo en la azteka kaj en la berbera... Daŭras multfakaj sciencesploroj kaj ties rezultojn oni ĝisatendu por vortigi fidindan konkludon.

S. BONIOL



Mecenatoj en Esperantujo (fino)

"Biblioteko de la Lingvo Internacia Esperanto".

ĉ) Emile Javal (1839-1907) estis eminenta oftalmologo, eks-parlamentano kaj membro de la Franca Akademio pri Medicino. Unu el la celoj de lia fervora laboro por Esperanto estis akiri oficialan agnoskon de la lingvo en Francio, kaj tiurilate li uzis sian personan influon. Li testamentis kapitalon por certigi la funkciadon de la Centra Oficejo.

d) Hector Hodler (1887-1920), la filo de Ferdinand Hodler, konata svisa pentristo, estis lernejamiko de Edmond privat en Genevo,

kie ili kunlaboris en redakta kaj administra laboro por Esperanto. Aĉetinte la revuon Esperanto de Paul Berthelot, li fariĝis ĝia dua redaktoro en 1907. La sekvan jaron li fondis Universala Esperanto Asocio.

Bernard GOLDEN

JULES VERNE

En 1978 la franca urbo Nantes inaŭguris muzeon dediĉatan al Jules Verne, kiu naskiĝis en 1828 en tiu urbo. Efika maniero celebri datrevenon de fama verkisto, kiu entuziasmigis milojn kaj milojn da legantoj, kaj ankaŭ venigi junulojn al mirindaj legaĵoj. La Nantes-muzeo helpas la diversnaciajn vizitantojn malkovri ne nur genian verkiston sed ankaŭ klerulon, kiu, ĉe la naskiĝo de Esperanto tuj fidis ĝin; Esperanto respondis lian propran altiron al kompleta internacieco de la Teranoj; li eĉ akceptis la honor-prezidantecon de la Esperanto-grupo en Amiens, kie li vivis post sia edziĝo.

Do, jam antaŭ pli ol unu jarcento Jules Verne imagis kaj priskribis multajn "sciencajn fikciojn", pli ĝuste eltrovaĵojn el kiuj pluraĵiĝis realaĵoj poste: nukleajn submarajn ŝipojn, vojaĝojn al kaj sur la luno, laseron, (de li nomitan la "verda radio"), televidon en la verko "La kastelo de la Karpatoj", radioaktivan korpon en "La ĉasado al meteoroj", eĉ la klimat-ŝanĝojn en "De supre, returne al malsupre". Tankojn, aviadilojn, fuzraketojn li priskribis, muntis kaj malmuntis, kvankam neniam li havis la eblecon koni planojn de specialistoj. Jules Verne kutimis aserti, ke "Ĉio imagebla de homo povas esti realigebla de aliaj homoj".


Aliflanke, li tutkompreneble estis influata de "futurismo", en epoko, kiam nia mondo travivis veran industran revolucion. Laŭ esploristoj pri la Verne-verkaro, la verkisto ne strikte dirite inventis sed mirinde ekkonsciis kaj emfazis la plej etajn teknikajn elpensadojn, malkovrojn, ekrealigadojn de la industria erao. Fakte Jules Verne ĉeestis la naskiĝon de fervojoj, tramoj, de la gaso kaj elektro, de la telefono, de la fonografo... Okazas, ke liaj herooj jam uzas trajnojn en regionoj, kie fervojoj,

ankoraŭ ne estas konstruitaj en 1991!

La scivolemo de Jules Verne estis senlima. Senlace li amasigis konojn en fakoj plej diversaj. Neniam li hezitis kompili el bonaj fontoj, ne nur pri geografio por verki "La infanoj de kapitano Grant", pri geologio por "Vojaĝo al la centro de la Tero", sed ankaŭ pri fiziko, astronomio ...

Por tion fari li, sen aŭtentika sciencista klereco, ĝisfunde esploras ĉiujn gazetojn kaj revuojn, kiuj, pere de la "Industria Societo de Amiens" venis al li, tiea kaj tiama urbestarano. Kuzo lia, politeknikisto, incis lin pri matematiko, kaj Jules Verne miras je konstato, ke simpla komo mallogike lokita en fiziko-problemo, povas naski katastrofon! Tiel, lia romano "De la Tero al la Luno" redonas al ni kalkulojn plej ekzaktajn, sed en "De supre, returne al malsupre", la eraroj faritaj de la matematikistoj tute ŝanĝas la celon de ili antaŭviditan.

Ankaŭ la maro ludis gravan rolon en la verkoj de Jules Verne. Fakte, dum sia tuta junaĝo, nia Nantes-ano povis revii, antaŭ la rivero Loire, kiu, sub la fenestroj de lia naskiĝdomo, kunportis al



la Oceano multajn plej diversajn ŝipojn. Verŝajne tiaj revoj prisemis la junan cerbon per verkoĝermoj uzotaj en "La artefarita insulo" aŭ "La insulo kun helicoj", kiu prezentas Atlantidon elmergiganta el akvo, por ke nova hom-civilizacio revekiĝu post tutmonda katastrofo.

Ankaŭ filozofiajn konojn oni malkovras en iuj el liaj romanoj, ekzemple pri la ŝippereantoj de la "Jonathan", kiujn oni povas identigi kun Poloj fuĝantaj de la rusaj caroj. En alia romano, orgojlo de klerulo... aŭ frenezulo, celas estri la mondon. Ankaŭ la malbonan flankon de sciencaj inventoj li antaŭvidis kaj kondamnis, kiam ili estas uzataj cele al ruinigo kaj pereigo. En la romano "Frunte al la flago", ni legas pri forrabo de viro, kiu inventis maŝinon sufiĉe eksplodpovan por detruĝi tutan ŝiparon. Alia verko, "Robur la giganto" temas pri invento de giganta helikoptero. En "Hektor Servadak" parto de la Tero, kunportata de kometo, daŭre rondiros en la suna sistemo!

Resumi ĉiujn konojn kompilitajn de Jules Verne en fakoj plej diversaj kaj de li redonataj, kiel proksimaj futuraĵoj estus vere tro longa nombrado. Tamen estas utile akcenti la flankan rolon de la genia verkisto, kiu, konata en multegaj landoj dank'al tradukoj, sukcesis levi pasiojn en sinsekvantaj generacioj dissemante en ilin kredon je scienca estonteco, je spacaj eventoj estritaj de la homo mem. Ankaŭ apostolo li estis pro emo al scienco utila kaj konstruema, kaj kontraŭ la scienco minacanta kaj detruema.

La genio de Jules Verne devenas esence el lia eksterordinara scienca racionalismo kunligita al konstanta fido je la homo. Nedube, tiu pensmaniero kondukis la verkiston al tre optimisma kredo je bonfaroj de progresoj, kiuj devus helpi kaj alporti al la homaro konstantan feliĉon kun malpliigo de ĉiuj penigaj streboj. Sed neniam la verkisto antaŭvidis la tutmondan evoluon de la hom-rilatoj. Oni trovas nenian

politikan anticipon en liaj romanoj. Aliparte, se Jules Verne antaŭvidis la rariĝon de la krudaj materialoj, li preteratentis la neceson de natur-ekvilibro. Li tute ignoris ekologion. Neniu el liaj verkoj aludas pri tiu temo.

Daŭre restas la influo de Jules Verne ĉe la malnovaj kaj novaj legantoj kaj la aŭdvidaj modernaj aparatoj relanĉis la allogon. Jules Verne estas unu el la aŭtoroj, kiuj, tra la mondo, plej grandskale inspiris la kinoarton, arton, kiun cetere li ankaŭ antaŭvidis kaj anoncis, kiel li faris pri radio, televido kaj multaj aliaj inventaĵoj de la 20-a jarcento. Neeblas kalkuli la nombron da filmoj eltiritaj el liaj verkoj, despli ĉar la universaleco de lia verkaro ebligis adapton je ĉiuj gustoj aŭ tendencoj; plie, la konstanta allogo de la kino-kaj televid-spektantoj al fantasto kaj "fikciaj sciencoj" pliampleksigis la ŝaton al la romanoj de la Nantes-ano.

(El parolado farita en Gresillon kiel enkonduko al vizito de la muzeo Jules Verne en Nantes)



- Mi pagis mian abonon ĝustatempe.
Kaj vi ?

Mecenatoj en Esperantujo

Kiu estis Mecenaso? Unu el la plej elstaraj kontribuantoj al la disvolvo de la antikva romia kulturo estis viro, kiu mem ne kreis beletrajn ĉefverkojn, sed subtenis per materiaj rimedoj junajn poetojn, kiel Vergilion, Horacion kaj Propercion. Gaius Cilnius Maecenas, kiu estas konata en Esperanto, kiel Mecenaso, vivis inter 74 kaj 64 a.K. ĝis 8 p.K. Li estis riĉa romia kavaliro, devenanta de eminenta etruska familio, kiu fariĝis konfidenculo de la imperiestro Aŭgusto. Tiu ĉi alte estimis la diplomatan lertecon de la granda patrono de la artoj.

Kiuj estis la Mecenatoj en Esperantujo?

Mecenaso havis imitantojn en aliaj lokoj kaj periodoj de la monda historio kaj ankaŭ en Esperantujo. Ĉu vi povas identigi jenajn kvin mecenatojn de la frua epoko de Esperanto, kiuj per sia malavara financa apogo helpis la antaŭeniradon de la movado kaj certigis ĝian kontinuecon kaj estontecon?

a) La unua mecenato de Esperanto estis posedanto de sapfabriko en Kovno (nuntempe Kaunas), Litovio. Li esperantistigis, kiam li jam estis maljunulo. Per lia helpo, la Unua Libro estis eldonita.

b) Okaze de la financa krizo, kiu trafis La Esperantisto en 1891 pro manko de sufiĉe da abonantoj, aperis sur la scenejo la dua mecenato. Li estis germana mineja termezuristo, kiu subvenciis la gazeton kaj sendis al Zamenhof monatan salajron por ties redakta laboro.

c) Kiam Lingvo Universala, la dua internacia gazeto en Esperanto estis fondita en Uppsala, Svedio, en 1895, rusa kemiisto kaj direktoro de vinber-instituto apud Odeso kontribuis monon por tiu entrepreno kaj fariĝis la ĉefredaktoro kaj

financa direktoro de la periodaĵo.

ĉ) Post la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco en 1905, la Esperantista Centra Oficejo estis organizita en Parizo. La iniciato venis de Generalo Sebert, kiu donis la unuan monsumon. Pli granda financa apogo venis de alia franca esperantisto, kiu havis la saman profesion, kiel Zamenhof.

d) La filo de fama svisa pentristo lernis Esperanton en 1903 dum li ankoraŭ estis mezlernejano. Li dediĉis sian vivon al Esperanto, vivtenante sin per malgrandaj pagoj, kiujn li ricevis de sia patro. La juna viro heredis la postlasaĵon de la patro post ties morto, kaj li agis same, testamentante la heredaĵon al Universala Esperanto Asocio.

RESPONDOJ-

a) Aleksandro Zilbernik, aŭ Silbernik (? -1906) estis la patro de kvar filoj kaj kvin filinoj. La plej juna el tiuj ĉi, Klara, fariĝis la edzino de d-ro Zamenhof. S-ro Silbernik kaj lia filino akordiĝis doni al Zamenhof parton de la doto de Klara antaŭ la geedziĝa ceremonio por ebligi eldonon de la Unua Libro. Poste, la bopatro de Zamenhof helpis lin finance dum tiuj jaroj, kiam la juna kuracisto ankoraŭ ne enspezis sufiĉe da mono de sia praktiko por vivtenadi la familion.

b) Wilhelm Heinrich Trompeter (1839-1901) estis adepto de Volapuko, kiu aliĝis al Esperanto en 1888 kaj, en 1890, fondis en Schalke, Vestfalio, unu el la plej fruaj Esperanto-grupoj. Proprakoste li eldonis Esperanto-lernilojn kaj propagandaĵojn. Lia subvencio de La Esperantisto daŭris tri jarojn.

c) Vladimir Aleksandroviĉ Gernet (1870-1929) esperantistigis en 1890. Krom sia redakta laboro, li tradukis Fantomoj de Vl. Korolenko (1896) kaj kune kun A. Kofman Pentraĵoj el Vojaĝo de H. Heine (1897). Li esperantigis ankaŭ la faman leteron pri la deveno de Esperanto, kiun Zamenhof sendis al Nikolaj Borovko. Alia projekto de Gernet estis la eldonado de

MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Sekvo)

Traduko de R. Dupuis

Kolero leviĝis en Edmond Dantes.
" Mercedes, mi ne sciis, ke mi rapidis al via hejmo por trovi tie malamikon." - " Malamikon!" ekkriis Mercedes kun kolerplena rigardo al sia kuzo. "Vi diras, ke estas malamiko en mia domo, Edmond. Se mi tion kredus mi tuj ekkaptus vian brakon, ni kune forirus al Marsejlo kaj neniam plu revenus tien ĉi". La okuloj de Fernand ekfulmis. " Kaj se trafus vin malfeliĉo, mia Edmond," ŝi aldonis kun senkompata flegmo, kiu pruvis al Fernand, ke ŝi malkovris la fundon de lia fipensado, "se vin trafus malfeliĉo, mi suprenirus la kabon Margion kaj min ĵetus sur la rokojn." Fernand fariĝis timige pala. "Sed vi eraris, Edmond", ŝi daŭrigis, "vi havas ĉi tie nenium malamikon; Fernand estas nur mia frato, kiu volas premi vian manon, kiel oni faras kun sindona amiko." Ĉe tiuj vortoj la knabino imperative rigardis la Katalunon, kiu kvazaŭ hipnotite alpaŝis al Edmond kaj etendis al li sian manon. Lia malamo simile al ondo furioza sed tamen potenca rompiĝis kontraŭ la supero, per kiu tiu virino lin regis. Sed apenaŭ ektuŝinte la manon de Edmond, li sentis sin elĉerpita kaj forkuris el la domo. "Ho!" li ĝemis irante, kiel frenezulo, kiu min liberigos de tiu viro? Kia malfeliĉo! kia malfeliĉo!" - "He! Kataluno! He, Fernand, kien vi kuras?" kriis voĉo. La junulo tuj haltis, ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis Caderousse kaj Danglars ĉetoble sidantajn sub foliara laŭbo. "He!" diris Caderousse, "kial vi ne venas kun ni? Ĉu tiel pelas vin tiaj urĝaĵoj, ke vi ne havas tempon por saluti la amikojn?" - "Precipe, kiam ili havas antaŭ si botelon preskaŭ plenan," aldonis Danglars.

Fernand rigardis ambaŭ virojn kun stulta mieno kaj nenion respondis. "Li aspektas kiel krevanta veziko" diris Danglars kun puŝeto de l'genuo al Caderousse; "Ĉu povas esti, ke ni eraris kaj ke kontraŭe al nia supozo Dantes estas la triumfanto?" - "Diable, necesas esplori", respondis Caderousse. Kaj li turniĝis al la junulo. "Nu, Kataluno, ĉu vi decidiĝas?" li demandis.

Fernand forviŝis la ŝviton, kiu fluis de lia frunto kaj malrapide eniris sub la laŭbon, kies ombro ŝajne iomete tranviliĝis lian menson kaj, kies freŝo balzame penetris lian elĉerpitan korpon.

"Bonan tagon," li diris, "vi min alvokis, ĉu ne?" Kaj pli falante ol sidiĝante sur unu el la seĝoj, li kuniĝis kun ili. "Mi vokis vin ĉar vi pasis, kiel frenezulo kaj mi timis, ke vi kuros rekte en la maron," diris Caderousse gajege. "Diable, kiu havas amikojn, tiu ne nur invitu ilin trinki glason da vino sed ankaŭ zorgu ke ili ne englutu litrojn da akvo."

Fernand ellasis ĝemon, kiu similis singulton kaj lia kapo nerezisteble falis sur liajn pugnojn krucmetitajn sur la tablo. "Nu, verdire Fernand," ekparolis Caderousse kun tiu krudo, kiu karakterizas la popolaĉon, kiam ĝia sciavolo forgesigas la etiketon, "nu! ĉu vi dronas en amo-marmelado?" Kaj brua rido akompanis tiun ŝercon. "Ho!" respondis Danglars, "vi blagas Caderousse; tia fortikulo ne bezonas timi amo-malsukceson." - "Pardonu", kontestis la alia aŭskultu kiel li singultas. Nu, nu, Fernand" diris Caderousse, "levu la nazon kaj respondu al ni; ne estas afable respondi per silento al demandoj pri via sano." - "Mia sano estas bona," respondis Fernand, pugnigante la manojn sed ne levante sian kapon. -Jen la afero, Danglars," diris Caderousse okulsignante al sia amiko, "jen la afero: Fernand, kiun vi vidas kaj kiu estas bona kaj brava Kataluno, unu el la plej bonaj fiŝkaptistoj de Marsejlo, amas belan knabinon kun la nomo Mercedes;

sed bedaŭrinde la ĉarmulino donis sian koron al la subkapitano de Faraono, kaj tiu Faraono ĝuste hodiaŭ venis en la havenon; do vi komprenas, ĉu ne?" - "Ne, mi ne komprenas," diris Danglars. "Sendube nia kompatinda Fernand estas nun forbalaita." - "Kaj tio vin amuzas, ĉu ne?" diris Fernand levante la kapon kaj rigardante Caderousse, kiel iu, kiu serĉas okazon ekkoleri. "Mercedes dependas de neniu kaj ŝi ja rajtas ami, kiun ŝi volas, ĉu ne?" - "Ha! se vi tiel miskomprenas," rediris Caderousse, "ni ĉesu pri tiu temo! Sed mi kredis vin Kataluno; kaj laŭdire la Katalunoj ne estas homoj, kiuj ŝatas venkon de rivalo; oni eĉ aldonas, ke precipe Fernand estas timige venĝema." Fernand malĝoje ridetis. "Amanto neniam estas terura," li diris. "Malfeliĉulo! daŭrigis Danglars, kiu ŝajnis tutelkoran kompaton al la junulo. Diable, li ne supozis, ke li nun subite revidos Dantes ĉi tie; li eble kredis lin morta, malfidela, kiu scias! Tiaj aferoj estas despli malagrablaj, kiam ili tiel surprizas." - "Sed ĉiuokaze," diris Caderousse, kiu trinkis dum li parolis kaj kiun la danĝera vino de La Malgue komencis ebrigi, "ĉiuokaze Fernand ne estas la sola, kiun la feliĉa reveno de Dantes ĉagrenas; ĉu ne Danglars?" - "Ne, vi pravas kaj mi preskaŭ kuraĝus diri, ke tio por li malbonaŭguras." - "Nu, iel ajn," aldonis Caderousse dum li verŝis vinon por Fernand kaj la okan aŭ dekan fojon plenigis sian glason, male de Danglars, kiu estis apenaŭ gustuminta; "iel ajn li edziĝas al Mercedes, al la bela Mercedes; tio estas la evidenta celo de lia reveno."

Dum tiu tempo la boranta rigardo de Danglars envolvis la junulon, kies koron trafis la vortoj de Caderousse kiel fandita plumblo. "Kiam okazos la geedziĝa festo?" - "Ho! pri tio ankoraŭ ne temas!" grumblis Fernand. - "Ne, sed baldaŭ ĝi okazos", diris Caderousse, "same certe kiel estas okazonta la kapitanigo de Dantes sur Faraono, ĉu ne, Danglars?"

Danglars ektemis je tiu incito neatendita; li rigardis Caderousse por legi sur lia vizaĝo ĉu temis pri intenca ofendo; sed li vidis nur envidemon sur tiu vizaĝo jam trafita de l'ebrio." Nu", li diris, plenigante la glasojn, "ni trinku je la sano de Kapitano Edmond Dantes, edzo de l'bela Katalunino!". Caderousse levis la glason al sia buŝo per peza manoj kaj eltrinkis en unu gluto. Fernand prenis sian kaj romp-ĵetis ĝin teren. "He!he!" diris Caderousse, "kion mi vidas tie, supre de l'monteto ĉe la Katalunoj? Rigardu Fernand; viaj okuloj estas pli bonaj ol miaj; mi kredas, ke mi komencas vidi nebulon; vi scias, ke la vino estas perfida; ŝajnas, ke estas du geamantoj kune promenantaj man-en-mane. Dio min pardonu! Ili ne supozas, ke ni vidas ilin, kaj jen ili kisas unu la alian!"

Danglars kaptis eĉ ĉiun eron el la reagoj de Fernand, kies vizaĝo pli kaj pli ŝanĝiĝis. "Ĉu vi konas ilin, s-ro Fernand?" li demandis. "Jes," li respondis kun sentona voĉo, "estas s-ro Edmond kaj f-ino Mercedes." - "Ha!", diris Caderousse, "ĉu eblas, ke mi ne rekonis ilin! He! Dantes! he! belulino! Venu do ĉi tien kaj diru al ni kiam okazos la geedziĝo, ĉar jen s-ro Fernand, kiu obstineme rifuzas diri tion al ni." - "Silentu!" diris Danglars, ŝajne retenante Caderousse, kiu tipe ebrie obstina kliniĝis ekster la foliaron; staru korekte kaj lasu la geamantojn trankvilaj. Nu, rigardu s-ron Fernand kaj sekvu lian ekzemplon: saĝa li estas.

Eble, incitite kaj pikite de Danglars, kiel virbovo per pikiloj en areno li fine estis eksaltonta ĉar li ŝajnis preta ataki sian rivalon; sed Mercedes, rektestarante kaj ridetante levis sian belan kapon kaj briligis sian klaran rigardon; tiam Fernand memoris ŝian minacon pri memmortigo se mortus ŝia karulo; senkuraĝigite li tiam refalis sur sian seĝon.

Danglars alterne rigardis la du virojn: unu estis stultigita de l'ebrio, la alia sklavigita de amo.

"Nenion mi atingos per tiuj stultuloj; li flustris al si mem; "mi timas, ke mi troviĝas inter drinkulo kaj timulaĉo; jen ĵaluzulo, jen idioto. La unua ebriiĝas per vino anstataŭ malamo; la alia, kies amatino estis rabita, nur ploras kaj ĝemas, kiel infano. Tamen liaj okuloj flamiĝas, kiel tiuj de Hispanoj, Sicilianoj kaj Kalabranoj, veraj venĝartistoj! Liaj pugnoj kapablas frakasi bovkapon. La sorto evidente favoras Edmond; li edziĝos al la belulino, li fariĝos kapitano kaj nin primokos; escepte se... (diabla rideto aperis sur la lipoj de Danglars) escepte se mi intervenas.

"He! "refoje kiiis Caderousse, duone starante kaj sin apogante sur la tablo per la pugnoj, "he! Edmond! Ĉu vi do ne vidas la amikojn, aŭ ĉu vi jam estas tro fiera por paroli kun ili?" - "Tute ne, mia kara," respondis Dantes, "mi ne estas fiera sed mi estas feliĉa, kaj feliĉo blindigas verŝajne pli ol fiero." - "Brave! jen klarigo," diris Caderousse. "He! bonan tagon, sinjorino Dantes." Mercedes malvarmete reciprokis la saluton kaj diris: "tio ankoraŭ ne estas mia nomo kaj laŭ onidiro mialanda, kiu nomas fianĉinon per la fianĉa nomo, tiu aŭgurigas malfeliĉon; do bonvolu diri 'Mercedes' mi petas." - "Ni tamen pardonas nian bonan najbaron Caderousse," diris Dantes; "estas nur eraro bagatela." - "Vi do tre baldaŭ festos la geedziĝon, ĉu ne sinjoro Dantes?" demandis Danglars kun saluto al la ĝejnuloj. "Kiel eble plej baldaŭ, sinjoro Danglars; hodiaŭ ni faras ĉiujn interkonsentojn ĉe paĉjo Dantes kaj morgaŭ, aŭ plej malfrue postmorgaŭ, ni tion festos per vespermanĝo ĉi tie en La Reserve. Ni esperas, ke niaj geamikoj ĉeestos; tio signifas ke vi, sinjoro Danglars, estas invitita; ankaŭ vi, Caderousse." - "Kaj Fernand," demandis Caderousse kun malklara rido, "ĉu Fernand ĉeestos?" - "La frato de mia edzino estas mia frato," respondis Edmond; "Mercedes kaj mi treege bedaŭrus se li forestus en tiu cirkonstanco.

Fernand melfermis la buŝon por

respondi sed lia voĉo tiel sufokiĝis en lia gorĝo, ke li ne povis prononci eĉ unu vorton.

"Hodiaŭ la interkonsentoj, morgaŭ aŭ postmorgaŭ la gefianĉiĝo. Diabla! kiel vi rapidas, kapitano!" - "Danglars," korektis Edmond, "kiel ĵus diris Mercedes, ne donu al mi titolon, kiun mi ankoraŭ ne havas, tio estus malfeliĉiga aŭguro." - "Pardonu," respondis Danglars, "mi simple diris, ke vi estas rapidema; ĉar ni ja havas tempon: Faraono ne reforiros antaŭ tri monatoj." - "Oni ĉiam volas rapidi, kiam la vojo kondukas al feliĉo, sinjoro Danglars; kiu suferis dum longa tempo, tiu malfacile kredas je feliĉo. Tamen ne nur egoismo min urĝigas; mi ankaŭ devas iri al Parizo." - "Ĉu vere? Al Parizo; ĉu ne unuafoje vi tien iros?" - "Jes!" - "Ĉu por aranĝi aferon?" - "Jes, sed ne aferon mian. La lastaj instrukcioj de nia kompatinda kapitano Leclere estas plenumendaj; vi komprenas, Danglars, ke tio estas sankta devo. Cetere ne timu, mi nur bezonas iri kaj reveni." - "Mi komprenas," laŭte diris Danglars. Kaj mallaŭte, "Al Parizo, sendube por enmanigi al la adresato la leteron, kiun la granda marŝalo konfidis al li. Nu diable! tiu letero donas al mi ideon, bonegan ideon! Ha! Dantes, vi ankoraŭ ne kuŝas, kiel numero Unu sur la registro de Faraono.


Turniĝante al Edmond, kiu jam retiriĝis, li kiiis: "Bonan vojaĝon!" - "Dankon," respondis Edmond, turnante la kapon kaj akompanante tiun movon per amika gesto.

Kaj la du geamantoj daŭrigis sian vojon, ĝojaj kaj trankvilaj, kvazaŭ du elektitoj suprenirantaj al la ĉielo.

(daŭrigota)

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO



NOVA ENIGMO

La solvo konsistas el 82 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj pere de la sekvantaj ŝlosilvortoj:

- 18-16-19-11-41-7-2-38-51-17: festego
- 40-20-32-28-5-21-9-23-31: oficiala monhelpo
- 12-56-60-29-3-8-1-13-57-35: insulriĉa maro
- 44-17-66-47-34-31-22-68-27-4-37: marnivela
- 30-42-54-10-26-48-25-55: haŭtŝmira graso
- 36-52-72-35-41-63-50-70: tabakveneno
- ⁶²
62-45-6-68-71-57-58-4-74: kantbirdeto
- 15-1-24-14-65-75-41-79: mambestego
- 33-43-78-39-56-81-76-68-73-82-41-55: verdstelulo
- 59-49-3-18-53-26-61-66-70: manĝilo
- 64-67-26-77-51-74: marĉa stilzbirdo
- 46-19-80-23-11-5-72-9-29-79: kruelegaĵo

1-82: oraj vortoj de la amerika filozofo R. W. Emerson.

LA VIVO EN GRESILLON

ĜENERALA KUNVENO - 11-an de MAJO 1991

La ĉiujara statuta Ĝenerala Kunveno de la membroj de la Esperantista Kulturdomo okazis la 11-an de majo 1991, en Gresillon. Prezidis la kunvenon S-ro Jacques Decobert. Ĉar la nombro da ĉeestantoj kaj de reprezentataj membroj superis la laŭleĝan kvorumon, la prezidanto malfermis la kunvenon je la 15-a horo.

Nur du akcioj estis repagitaj dum la jaro 1991 aŭ pli ĝuste transformitaj en donacojn. Cent dekok novaj akcioj estis registritaj, akiritaj de malnovaj membroj aŭ de novaj.

La financa raporto montras kreskon de la enspezoj pri restadoj. Responde al demando de ĉeestanto, estas precizigite, ke tiu kresko respondas ĉefe al altigo de la restad-tarifoj, ĉar la nombro da diurnoj ne multe ŝanĝiĝis jam de kelkaj jaroj. Sed pli kaj pli da restadoj estas nelongdaŭraj, kelkfoje malpli ol unusemajnaj, do je tarifo pli alta; tiu faktoro ampleksigas la antaŭan, kaj klarigas la kreskon de la aliĝ-enspezoj. La nutrado-elspezoj iom kreskis sed la salajro-elspezoj iom malkreskis.

Koncerne la informojn pri la bilanco, kelkaj demandoj estas faritaj kaj ankaŭ proponoj. Mallonga diskutado ekestas. Ĉu necesas aperigi en la bilanco provizojn, dotaĵojn? Iu sugestas studadon de la "Loĝ-Sparo".

La raporto pri aktivado ne okazigas multe da rimarkoj. Diskutado pri la kursoj kaj la malfacilo, ĝis la lasta momento, scii pri la nivelo de la diversaj kursanoj okazigas la jenan sugeston: trapasigo de testo nepre sukcese trapasotan por la ĉeestantoj de la 2-a nivela kurso. La opinioj estas diversaj, ne ĉiuj favoraj, sed provo estos farita.

Ĉiuj raportoj estas akceptitaj unuanime, post la respondoj al la diversaj demandoj.

Plia diskutado temas pri eventuala nova klasado de la libroj de la biblioteko, kaj ankaŭ pri la titolo de la nova perkoresponda kurso unuanivela: ĉu "programita", ĉu "memkorekta"? La lasta titolo estas adoptita.

La prezidanto fermas la kunvenon je la 17.30-a horo.

La kunveno-sekretario,

Pierre BABIN

Ĉeestas la kunvenon, kiu komenciĝas ek de la 10-a horo matene:
D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, G. Dairon, R. Lenel, G. Lagrange,
P. Métivier, J. Vincent.

Senkulpiĝis: S. Bourrot, P. Chevalier, B. Cheverry, P. Gemin,
F. Lemagadure, R. Lloancy, P. Naulet.

Dum la Printempa staĝo tridek sep personoj partoprenis, el kiuj dek naŭ infanoj venantaj de Le Mans kun ges-roj Huberdeau, de Puy-Guillaume kun J.L. Kristos, de Noyant kun S-ino Naulet. Tiuj grupoj ricevis stipendiojn de G.E.E. kaj, en kelkaj okazoj, de lokaj asocioj. Aliaj infanoj venis kun la gepatroj. Gvidis la kursojn: M.T. Lloancy kaj Ilona Koutny. Estis prezentita, dank'al S-ino Naulet, tre interesa ekspozicio de infan-desegnaĵoj el la urbo Samarkand. Premioj estis senditaj al la "artistoj". La ekspozicio estis vizitita de regionaj ĵurnalistoj. Alia interesa ero de tiu staĝo estis la prezentado, fare de Ilona Koutny, de voĉsintezan aparaton.

Kiom da personoj ĉeestos la venontsomeraĵn staĝojn ? Ne eblas respondi ĉar informpetoj konstante kaj malfrue alvenas. La programo ricevos kelkajn ŝanĝojn pro la neĉeesto de Daniel Moirand, kiu nek gvidos kurson, nek administros periodon, kiel antaŭplanite, pro profesiaj devigoj.

La komitato poste diskutas pri la projekto de programo por la jaro 1992. Jen la antaŭvidita kalendaro:

de la 12-a ĝis la 26-a de Aprilo: Printempa Renkonto de Infanoj, kaj kursoj por adoltoj.

de la 24-a de junio ĝis la 9-a de julio: Internacia Amika Renkonto.

la kvar sekvaj periodoj estos dediĉitaj al la kutimaj kursoj, prelegoj kaj turismaj aranĝoj:

de la 9-a ĝis la 22-a de julio - de la 23-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto - de la 6-a ĝis la 20-a de aŭgusto - de la 20-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro.

La prezidanto klarigas, ke li rifuzas la konkludojn de la raporto de la impost-kontrolistino koncerne TVA. La neakceptitaj punktoj de tiu raporto estas nun diskutataj kun la impost-direktoro. Por eviti tiajn estontajn diskutojn estos nepre necese revivigi la Kulturan Asocion de Gresillon, kiu zorgos pri la kultura flanko de nia afero. Plano estos prezentita al la venonta ĝenerala kunveno en 1992.

La prezidanto fermas la kunvenon je la 16-a horo.

La sekretario,
Guy Dairon

NIA KONKURSO

Jen la respondoj al la demandoj de la tri serioj :

1-a serio :

- 1) La bona lingvo - Regulus - Varmas en Romo - La Laŭta Verkhorloĝo - La Fenomeno Esperanto.
- 3) L.L. Zamenhof.
- 4) jes - ne - jes - ne - jes.

2-a serio :

- 1) Kalocsay - Boulton - R. Rossetti - Szilagyi - Forge.
- 3) Tri estis svisoj ; nur C. Piron estas belgo.
- 4) ne - jes - jes - jes - ne.

3-a serio :

- 1) Lorjak - Valano - Štimeč - Ragnarsson - Elgo.
- 3) Dona Barbara estis tradukita de F. de Diego. La aliaj titoloj estis originale verkita en esperanto.
- 4) jes - ne - jes - ne - jes.

4-a serio :

- 1) Goodheir - Kamačo - Urbanova - Tarkonyi - Engholm.
- 3) Tel Aviv.
- 4) ne - jes - jes - ne - ne.


La gajnintoj atingis preskaŭ saman nombron da poentoj. Ni eĉ devis dispartigi du el ili per lotumado. Plie ni aldonis sesan premion tiel proksima al la kvina estis tiu sesa gajninto. Jen la listo :

S-ino S. Humm (1000 f. por restado en Gresillon).
 F-ino M.J. Berger (500 f. por restado en Gresillon).
 F-ino C. Tulasne (250 f. por aĉetado de libroj).
 S-ro J. Rousseau (150 f. por aĉetado de libroj).
 S-ino Bernet (100 f. por aĉetado de libroj).
 S-ino Huberdeau (100 f. por aĉetado de libroj).
 Gratulojn al ĉiuj gajnintoj kaj al la aliaj partoprenintoj.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« ... igi » kun verbo signifas nek « igi-anta », nek « igi-ata », sed nur « igi-i », sekve ĝi povas tre bone esti uzata en ambaŭ sencoj... En tiuj okazoj, kie malkomprenigó povos aperi, ni devas ĝin eviti per precizigo de nia frazo mem. Ekzemple ni ne povas diri « sciigi amikon novaĵon », sed ni povas diri « sciigi amikon pri novaĵo » aŭ « sciigi novaĵon al amiko ».


(L.L. Zamenhof : Lingvaj Respondoj).



— Tio memorigas ion al mi : ĉu ni havas alternan aŭ kontinuan kurenton ?



— Tiu ludo ne tiom kurigas nin, kiom teniso.



— Ĉu li faras tion por sciigi nin pri baldaŭa enlitiĝo ?

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
- Belgio** : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
- Jugoslavio** : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.
- Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).
- Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol.).
- Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).
- Portugalia** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa.
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Federacio Brunngatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).
- Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkupoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozoj trankvile en atmosfera frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra cent-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupo al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34